



# *Bulgara* **ESPERANTISTO**





## ENHAVO

|                            |                                                                      |        |
|----------------------------|----------------------------------------------------------------------|--------|
| * * *                      | Du kongresoj — unu celo . . . . .                                    | 1      |
| * * *                      | Verda Tabulo . . . . .                                               | 2      |
| <b>Humphrey Tonkin.</b>    | Novjara mesaĝo 1976 . . . . .                                        | 3      |
| <b>Penjo Penev.</b>        | Ni el la dudeka jarcento.<br>Tradukis Tempesto . . . . .             | 4      |
| <b>Stojan Kostadinov.</b>  | Malliberula angoro . . . . .                                         | 4      |
| <b>Boris Kavalĝiev.</b>    | Pensoj pri la tempo . . . . .                                        | 5      |
| * * *                      | En la tuta lando Zamenhof-celebroj . . . . .                         | 6      |
| <b>Cvjatko Todorov.</b>    | Amikeco, kiu ne malnoviĝas . . . . .                                 | 7      |
| <b>Vasilij Grigorenko.</b> | Vigla Esperanto-vivo en Poltava . . . . .                            | 8      |
| <b>M. Belogorskij.</b>     | „Ni konstruu traktoron!“ . . . . .                                   | 9      |
| <b>D-ro M. J. Isaev.</b>   | Pri la bazaj metodologiaj problemoj de la interlingvistiko . . . . . | 10     |
| <b>D. Haĝiev.</b>          | Papulando-Novgvineo — unu el la plej junaj ŝtatoj . . . . .          | 13     |
| <b>K. G. Linton.</b>       | La edziĝo de Labadu . . . . .                                        | 14     |
| * * *                      | Tra la gazetaro. Deziras korespondi . . . . .                        | III-IV |

## Sur la kovrilpaĝo:

Unu el la plej gravaj objektoj de la Sesja Kvinjara Plano: La atoma elektrocentralo apud Kozloduj

*Sur la fotoj:* La sincera amiko de la bulgaraj esperantistoj kaj la bulgara popolo Petro Poliŝĉuk el Taŝkento, USSR. Ĉiujare li akceptas E-gastojn el multaj landoj:

P. Poliŝĉuk kun sia hungara amiko Ervin

P. Poliŝĉuk kun sia rumana amiko M. Braun

P. Poliŝĉuk kun sia sveda amiko Lars Johanson





## DU KONGRESOJ — UNU CELO

*La antaŭstaranta XI-a kongreso de la Bulgara Komunista Partio akceptos gravegajn dokumentojn — la direktivojn por la Sepa Kvinjara Plano kaj la bazajn direktojn por socipolitika disvolviĝo de Popola Respubliko Bulgario ĝis 1990 jaro. Tiuj dokumentoj havas ekskluzivan signifon por la realigo de la senpera historia celo, fiksita en la Programo de BKP.*

*Inter la decidoj de la X kaj XI kongresoj de BKP ekzistas nerompebla ligo, ili havas komunan grandan celon: konstruo de matura socialisma socio en Bulgario. La estonta soci-ekonomia disvolviĝo de nia lando dependas altgrade de la rezultoj, atingitaj per la antaŭaj kvinjaraj planoj en la sfero de la industrio, agrikulturo kaj transporto, de la ekzistantaj materialaj kaj laboraj fontoj, de la disvolviĝo de la scienco, teknika progreso kaj kulturo, de la atingoj, en la organizado de la laboro, en la produktado kaj administrado.*

*La bilanco de tiuj ĉi atingoj estas pli ol optimisma. Nia nacia ekonomio estas en senĉesa supreniro, ĝi disvolviĝas per altaj kaj stabilaj ritmoj. Plej grandan ekonomian kreskon ni havas senpere post la Aprila Plenkunsido de CK de BKP (1956). Dum la periodo 1958—1960 j. la socia produkto kreskis ĉiujare meze per 13,5%, kaj la nacia enspezo — per 11,6%. Altan ekonomian kreskon nia lando efektivigis per la sukcesa plenumo de la Sesa Kvinjara Plano, ĉe kiu la meza kresko de la nacia enspezo estis 7,6% jare. Paralele kun la altaj kaj stabilaj ritmoj de ekonomia kresko okazis esencaj ŝanĝoj en la faka kaj teritoria strukturo de la popola mastrumo.*

*Dum la pasinta periodo la realaj enspezoj de la loĝantaro senĉese kreskis kaj dum la periodo 1960—1974 pligrandiĝis 2,14-foje. La popola regpotenco plialtigas la enspezojn de la laboristoj, oficistoj kaj vilaĝanoj-kooperativanoj, sisteme transformas la agrikulturan produktadon en specon de la industrio.*

*Por efektivigi la decidojn de la X kongreso de BKP kaj de la Decembra Plenkunsido de CK de BKP (1972) ĉe ni estas efektivigataj soci-ekonomiaj iniciatoj, kies nura celo estas la bono de la tuta laborpopolo: oni plialtigas la salajrojn de multaj kategorioj de laboruloj, pligrandigas la sociajn fondusojn por persona konsumado, akcelas la loĝejonkonstruadon, plibonigas la priservon de la loĝantaro kaj ties provizon per varoj por amasa konsumado.*

*Novajn perspektivojn en la soci-ekonomia disvolviĝo de la lando konturas la publikitaj jam tezoj de CK de BKP pri la ekonomia disvolviĝo kaj la tezoj de CK de BKP pri la bazaj direktoj de disvolviĝo de la scienco kaj la teknika progreso dum la Sepa Kvinjara Plano kaj ĝis 1990 jaro. Per plenumo de la starigitaj en ili taskoj oni atingos pli altan ekonomian nive-*

lon, kiu permesos kontentigi ankoraŭ pli bone la senĉese kreskantajn materialajn kaj kulturajn bezonojn de la popolo.

La bulgaraj esperantistoj dum la periodo antaŭ la XI kongreso de BKP ankaŭ estas kaptitaj de laborentuziasmo. Per sia partopreno en la konkretaj faroj de sia entrepreno, agrarindustria komplekso, oficejo aŭ lernejo ili kontribuas por la efektivigo de la taskoj, starigitaj de la Partio por la popola bono kaj feliĉo.

## VERDA TABULO

En la abonkampanjo de „Bulgara Esperantisto“ por 1976 j. ni atingis grandan sukceson — estis kolektitaj 6000 abonoj! Tio estas rekorda cifero en la historio de la E-movado en nia lando. Dankon al ĉiuj distriktaj komitatoj, societaj estraroj kaj apartaj aktivuloj, kiuj akurate laboris kaj grave kontribuis por tiu sukceso!

Unuan lokon okupis DK de BEA en SMOLJAN — ĝi kolektis 649 abonojn.

Unuan lokon en la distrikto kaj verŝajne en la tuta lando okupis la E-Societo „Fajrero“ en Dospat — ĝi kolektis 210 abonojn. Plej multe por tiu sukceso kontribuis EMIL ĈIRPANSKI — prezidanto de la Societo, kaj la instruistinoj VELURINA ĈIRPANSKA kaj NADEJDA DIMITROVA.

Bonegajn rezultojn atingis ankaŭ la E-aktivuloj:

PAUN NESTOROV — sekretario de E-Societo „Roza Valo“, Kazanlâk — 121 abonojn.

DIMITR IVANOV — el E-Societo „Kulturo“, Plovdiv — 103 abonojn.

## III INTERNACIA ARKEOLOGIA LABORBRIGADO POR E-JUNULARO „D-RO L. L. ZAMENHOF“

8—31 de aŭgusto 1976 u. Marica, distrikto de Haskovo



La brigadon rajtas partopreni nur studentoj kaj junuloj-esperantistoj. La brigadanoj laboros po 7 horoj tage (ĝis tagmezo) sur la antikva fortikaĵo „Asara“.

Posttagmeze — varia programo: E-kurso, kantado, renkontiĝoj kun esperantistoj el najbaraj urboj, aŭtobusaj ekskursoj al vidindaj lokoj ka. Vespere — amuzoj, dancoj.

Post la brigado — senpaga ekskurso al la ĉarma Nigra Maro.

Aliĝo: por bulgaraj studentoj — ĝis la 1 de marto, por alilandanoj — ĝis la 10 de majo.

Adreso; BULGARIO. SOFIO, P. K. 66, BULGARA ESPERANTO-JUNULARO (por la brigado).





## NOVJARA MESAĜO 1976

Ni ricevis „Novjaran Mesaĝon 1976“ de s-ro Tonkin, kiam jam n-ro 1 de „Bulgara Esperantisto“ estis en la presejo. Tial ni aperigas ĝin en n-ro 2 kun kelkaj mallongigoj.

Komence de sia „Mesaĝo“ la prezidanto parolas pri la bona kaj utila laboro de la 60-a UK en Kopenhago, aparte substrekkante ĝian rolon por la plua reunuigo kaj refortigo de UEA kiel plej aŭtoritata kaj reprezenta organizaĵo de la tutmonda E-movado. Danke parolas la prezidanto ankaŭ pri la nobla pozitiva kontribuo de d-ro Pol Denoël tiurilate. Plue s-ro Tonkin diras:

La Asocio estas sur bona vojo al kompleta saniĝo. Sed restas la demando, ĉu tiu resaniĝo fariĝos daŭra, firma kaj konstanta. Kaj kiel transformi la foje durajn lecionojn de la pasinteco en sukcesojn de morgaŭ? Ni havas certan senton pri ni mem, heredaĵon de multaj jaroj da laboro por Esperanto, kiu enhavas multajn bonajn ecojn, sed eble bezonas modifon. Ni emas supozi, ke la fortoj de la Esperanto-movado estas tre limigitaj. En certaj sencoj tiu supozo estas, kompreneble, tute prava: niaj rimedoj ne estas senlimaj kaj ni ne povas ĉion. Sed en aliaj sencoj ĝi estas profunde erara. Kultura movado kiel la nia, kiu kalkulas inter si centmilojn da aktivuloj kaj simpatiantoj, malantaŭ kiu staras longa, klara kaj impona historio, havas fortojn kaj potencialojn grandegajn. La sukceso de Esperanto venos, kiam ni trovos la vojon al plena utiligo de ĉiuj tiuj fortoj je nia dispono, kiam ĉiu homo kontribuos libervole kaj ĝis maksimumo, kaj kiam ni igos nian historion labori por nia estonteco.

Tiu maksimuma strebo por nia idealo — la idealo de komuna internacia lingvo por ĉiuj homoj — kuŝas interne de niaj kapabloj, sed ni ankoraŭ ne plene realigas ĝin. Persone mi opinias, ke ĝi estos realigebla ne per internaj kvereloj pri neesencaj demandoj, sed per toleremo, komprenemo, reciproka respekto, kaj (ĉefe) sinceraj klopodoj trovi komunan grundon kaj difini klare niajn prioritatojn. Tiu estis la vojo de Zamenhof, eĉ se la historio foje alportis siajn renversojn. Tiu estu la vojo de ni, posteuloj de Zamenhof en pli skeptika, sed ne nepre pli saĝa mondo.

La spirito de Kopenhago jam montris, ke la vojo de komprenemo kondukas al konkretaj kaj pozitivaj rezultoj. Interalie ĝi permesas al ni koncentri niajn fortojn je la ĉefa tasko. Surbaze de tiu spirito venis nova esprimiĝo, flanke de niaj membroj, de konfido kaj laborpreteco. Tio speguliĝas en la bona reago al la nova Volontula Servo, en la konto „donacoj“ (kiu atingis rekordan nivelon en 1975) en la Societo Zamenhof, en la Financa Programo, en la laboro de la landaj asocioj. Nun necesas ĝuste etendi niajn limojn: kapti la atenton kaj simpatiaĵon de la publiko, gajni la subtenon de instancoj kaj organizoj, instrui la lingvon, saĝe informadi pri ĝi, evoluigi kaj pristudi nian Movadon kaj nian medion. Gravaj taskoj — sed indaj kaj realigeblaj taskoj!

Kio validas por UEA mem, kompreneble, validas por ĉiuj flankoj de nia vasta kaj vivoplena Movado. UEA ne laboras en vakuo, ne laboras en stolo. La laboro de la diversaj fakaj asocioj, la laboro de la neneŭtralaj organizoj, la eldona agado, la radio, la diligenta aktivado de amaso da instruistoj kaj lokaj organizantoj — ĉio ĉi ankaŭ floras en atmosfero de toleremo kaj celkonscio.

*Sur la sojlo de 1976 la Estraro de UEA kaj ĉiuj labororganoj de la Asocio salutas ne nur la membrojn de la Asocio, sed ĉiujn parolantojn de la Internacia Lingvo. Por la jaro 1976 UEA havas ambiciajn planojn, inter kiuj la 61-a Universala Kongreso en Ateno estos nur la plej festa kaj plej krona elemento. Ni invitas la tutan esperantistaron partopreni nian agadon, plene ĝui la propran esperantistecon kaj serioze entrepreni tiun nian kulturan respondecon disvastigi kaj evoluigi nian lingvon.*

*La jaro 1976 alportu sukceson, pacon, prosperon kaj sanon al ni ĉiuj!*

*Penjo Penev*

### NI EL LA DUDEKA JARCENTO

*Al Mitko, Lena kaj Jivka*

Al vi mi parolas,  
                                           id ar' -heredanto,  
 samtempul' mia,  
                                           en via nom'!  
 Parolas laŭ la vol'  
                                           de severa ordonanto,  
 kiu nomiĝas  
                                           koro  
                                           de hom'!  
 Peco post peco  
                                           feliĉon nian  
 ni derompadis  
                                           de l'tago-redut';  
 ero post er'  
                                           ĝin kolektas patrujo  
 kaj dolĉe ĝin trinkas  
                                           gluto post glut'.  
 Morgaŭ ja estos pli feliĉaj,  
                                           vere,  
 tiuj, kiuj  
                                           venos post ni!  
 Ili admire  
                                           nin dankos sincere  
 pro nia laboro  
                                           por la naci'!  
 Ĉar en batal'  
                                           kun obstakloj-gigantoj  
 paŝas ni ŝvite  
                                           kun arda fervor';

### POEZIO kaj BELETRO

Ĉar estas ni unuaj esplorantoj  
 de l'komunismo  
                                           en la frua hor'!  
 Ni estas  
                                           peniga  
                                           tagiĝo radia  
 de tago il'a!  
 Ni sen pretend'  
                                           portas hodiaŭ  
                                           sur dorso nia  
 la ŝarĝon grandegan  
                                           de nia jarcent'!  
 Kiam vidis  
                                           tion la mondo?  
 Kiu postenis  
                                           tiel ĉe l' front'?  
 Ja al la bordoj de nova estonto  
 ni estas  
                                           generacio-pont'!  
 Ĉu ne estas ĝojego  
                                           tio —  
 konscii la gravon  
                                           de nia  
                                           labor'?  
 Ho ne, mi cedus kontraŭ nenio  
 tiun ĉi ĝojon  
                                           de mia kor'!

*El la bulgara: Tempesto*

*Stojan Kostadnov*

### MALLIBERULA ANGORO

Izolita, sola en ĉelo n-ro 87, mi devis elsuferi dekdu kaj duon-jaran punon en la moderna malliberejo de Stara Zagora.

-----

La malgranda fenestro de la ĉelo estas supre, ĉe la plafono. De nokto-mezo mi atendas la aŭroron. Mi bone

scias, ke ĝi ne timas la altajn prizojn, ĝi neglektas la gardostarantojn soldatojn, ne timas iliajn kuglojn kaj senbrue eniras mian ĉelon tra la truoj de la fera fenestra krado, kvankam la fenestro rigardas norden. Sed frue estas ankoraŭ. Ĝi ne venas tiom frue. Mi atendas ĝin kaj miaj pensoj senbrue forlasas la prizonon kaj libere vagas





sur la Balkano tra izolitaj lokoj, tra krutaĵoj kaj densaj arbaroj, sur pintoj kaj en valoj. La pensoj katenon ne havas. Ili ne rekonas murojn kaj obstaklojn. Kiel senzorgaj birdoj ili elflugas al la Balkano, kiu estas tiel proksime de la prizono kaj tiel neatingebla por mi. Sendorme mi atendas en la lito la aŭroron. Lumon mi deziraŝ vidi, lumon! Sed la mallumaj suferaj horoj malrapide foriras. Finfine jam mateniĝas. Mi deziras premi mian vizaĝon al la fenestra krado. Lumo, lumo, aŭroro venas tra ĝi! Sed la kradon mi ne povas atingi. Eĉ se mi povus ĝisrampi ĝin, la gardostaranta soldato tuj sendus al mi kuglon. Sen averto, sen vorto li simple pafmortigas ĉiun, kiun li vidas en la framo de la fenestro. . . Li ĵaluze gardas la lumon de ni. . .

Mia vizaĝo estas pala. Tago post tago forflugas en silento, en senbruo. Nokto post nokto kun tomba silento kaj senbrueco alvenas kaj foriras. Mi atendas iun ajn diri al mi almenaŭ unu vorton, eĉ riproĉegi, insulti min, sed mi nur aŭdu homan voĉon. . . Per pugno mi frapas kelkfoje sur la muro. Mi deziras aŭdi ian ajn bruon, ian ajn sonon. Mi ne plu povas vivi en plena senbrueco, sen aŭdi homan voĉon, sen konversacii. . . La pezaj paŝoj de la mallibereja gardisto avertas, ke li proksimiĝas al mia ĉelo. Li hal-

tas antaŭ la pordo kaj fiksas rigardon tra la observtruo. La gardisto serĉas la rompanton de la senbrueco. Mi staras silenta kaj senmova en la mezo de la ĉelo. Li foriras. Forehas liaj paŝoj — kaj denove senbrueco, teda, turmenta senbrueco kaj silento.

Post pli ol kvar jaroj pro amnestio mi forlasis la prizonon. La unuaj amikoj, kiujn mi renkontis, diris al mi: „Via aspekto ne multe ŝanĝiĝis. Vi nur estas pli pala, pli blanka. Vi parolas malrapide, multe pli malrapide ol antaŭe. Krome ĉirkaŭ kaj post la oreloj via hararo jam estas griza. . . “

Sed mi vivis sola en la prizona ĉelo. Forestis iu ajn, kun kiu mi konversacius. Mi eĉ deĉutimiĝis paroli. . . Bone, ke mi tute ne forgesis paroli. . . Sed mi esperas, ke denove mi kutimiĝos paroli pli rapide. Mi restarigos mian normalan parolmanieron.

Kaj en la prizono mi eniris dudek kvin jara. . .

— — —

Nun, post pli ol 40 jaroj, mi vere normaligis mian parolmanieron, kvankam restis iaj postsignoj ĝenantaj la fluan rapidecon de mia parolado. Sed estis io, kio pligrandiĝis, kio plifortiĝis. Tio estas la malamo al la kapitalismo, al la faŝismo. Kaj la amo al la komunismo.

*Boris Kavalĝiev*

## *PENSOJ PRI LA TEMPO*

Tempo, oni diras, ke vi estas oro, kiu tamen flugas.

Jam dum mia infanaĝo ĉi tion mi aŭdis.

Ĉu vere vi flugas? De kie ĝis kie? Kia estas via rapideco, ankaŭ via celo?

Kiam vi komenciĝis, kion oni scias pri via fino?

La homoj vidas vin nur de sia naskiĝo ĝis la morto.

Vi estas superpotenco neimagebla.

Oni vin strikte mezuras, sed vi estas grandeco nemezurebla, por vi ne sufiĉas la ciferoj!

Tamen oni vin mezuras — per sekundoj, minutoj, horoj, tagnoktoj, semajnoj, monatoj, jaroj, jarcentoj, jarmiloj. Sed eĉ la eraoj dronas en via profundo.

Oni vin mezuras per tagnokta rondo, poste per la suna kaj luna orbitoj.



Kiom da horloĝoj ritme tiktakas, sed fine lacaj eluziĝas!

Tempo, vi kreas noktojn, por ke la homo ripozu, sed vi ne ripozas, vi nur senlace daŭras!

La generaciojn de la homaro vi ŝanĝas unu post alia. Kio estas nia vivo? — Nur eta de vi parteto!

En vi naskiĝas la homo, li kreskas,

lernas, planas, laboras, konstruas, sed fine eluziĝas, forpasas.

En la diversa homa agado vi, tempo, estas ĉiama faktoro, unua necesa elemento. En vi ĉio komenciĝas.

Nur vi, tempo, sen komenco kaj fino regas — tutpotenca, senmorta, eterna!

## ORGANIZA VIVO

### EN LA TUTA LANDO ZAMENHOF-CELEBROJ

**Stara Zagora.** La celebros de la 116-a naskiĝtago de d-ro L. L. Zamenhof okazis en la salono de legejo (kulturdomo) „G. Kirkov“ en ĉeesto de multnombra publiko. Raporton pri la vivo kaj agado de la kreinto de Esperanto faris Jivko Kolev — prezidanto de E-Societo „Verda Stelo“.

Lige kun la Internacia Jaro de la Virino parolis Spaska Nikolova.

Riĉan belartan programon prezentis lernantoj el VII-a klaso de X-a elementa lernejo, instruataj en Esperanto de Jana Terzieva kaj Rene Jordanova.

Sekvis projekciado de koloraj diapozitivoj, faritaj de s-ano Rusanov el E-Societo „Fervojisto“ — Stara Zagora. Filme li multon rakontis pri naciaj kaj eksterlandaj E-arangoj.

J. Kolev

**Bjala.** En solena kunveno pri Zamenhof, organizita de E-Societo „Paco“, parolis Stefan Popov — membro de DK de BEA en Ruse. La plej juna kaj plej nova esperantistino Canka Kostova deklamis bone „La Vojo“-n.

N. Fiĉeva

**Târgoviște.** E-Societo „Verda Eskadrono“ organizis celebros de Zamenhof en la klubejo „Titko Ĉernokolev“. Pri la afero de nia senmorta Majstro entuziasme parolis Stojan Šopov — prezidanto de la societo.

La solena kunveno finiĝis per riĉa programo, prezentita de lernantoj-esperantistoj el elementa lernejo „N. J. Vapcarov“ sub la gvido de sia fervora E-instruistino Maria Rajĉeva.

La sekvan matenon Radio Ŝumen raportis detale pri la celebros.

D. Koseva

**Loveĉ.** La solenan kunvenon dediĉe al la naskiĝtago de Zamenhof ĉeestis multnombra

publiko el junaj esperantistoj. Priokazan raporton faris Peĉo Vlaĥov — prezidanto de E-Societo „Espero“. Kun intereso oni aŭskultis ankaŭ la artikolon de la prezidanto de BEA Nikola Aleksiev „Utila propagando de la bulgara kulturo“, aperintan en ĵ. „Rabotniĉesko Delo“ la 12-an de decembro.

La belartan programon partoprenis Jovko Iliev, Cvetanka Igneva, Diana Ivanova. Oni aŭskultis ankaŭ gramofondiskojn kun E-kantoj.

I. Ivanov

**Pernik.** La celebros de Zamenhof okazis en la moderna Sindikata Domo. Pri la vivo kaj afero de nia amata Majstro parolis N. Mitev — prezidanto de DK de BEA. Je la temo „Esperanto kaj la Virinjaro“ parolis k-dino Ŝopova.

Altnivelan plezurigan belartan programon prezenis la lernantinoj el la eksa eksperimenta E-klaso de Cvetanka Zareva (el lernejo de u. Temelkovo).

N. Mitev

**Preslav.** La membroj de E-Societo „D-ro Zamenhof“ solene celebris la 116-an naskiĝtagon de sia patrono. La solenaĵon malfermis kaj gvidis la prezidantino Mariana Miltenova — lernantino en la 5-a klaso. La E-instruistino Rajna Stanĉeva rakontis pri la vivo de Zamenhof, turnante specialan atenton al la virinoj en lia familio.

Post belarta programo sekvis aparte emocia momento: la prezidanto de la Urba Komitato de BEA d-ro Popov enmanigis al la novaj membroj la membrokartojn kaj la insignojn kun la amata verda stelo. Ĝoje brilis la infanaj okuloj, vigle batis la junaj koroj. . .

La solenaĵo finiĝis per muziko, dancoj kaj kantoj.

Rusanka Vasileva, lernantino



**Ruse.** La aktivecoj de la esperantistoj en la urbo lige kun la 116-a naskiĝtago de Zamenhof komenciĝis per plenkunsido de DK de BEA pri la instruado de Esperanto en la distrikto. Ĝi okazis la 13-an de decembro en la Domo de la Bulgara-Soveta Amikeco. Krom la membroj de DK ĉeestis ankaŭ E-instruistoj kaj kursgvidantoj el la distrikto. Kiel gastoj ĉeestis la prezidanto kaj la sekretario de BEA Nikola Aleksiev kaj Kunĉo Vălev, la prezidantoj de DK en Varna, Smoljan, Veliko Târnovo kaj Târgoviște, esperantistoj el Razgrad k. a.

Raporton pri la E-instrulaboro en la distrikto faris Stojĉo Cankov — prezidanto de DK. Li notis, ke en la distrikto nun funkcias 16 E-kursoj kun 260 partoprenantoj. El la raporto kaj la vigla diskutado evidentiĝis tre serioza rilato al la E-instruado. Kompetentajn kaj tre

utilajn rekomendojn faris k-doĵ Aleksiev kaj Vălev.

En la sama salono vespere okazis la celebrego de Zamenhof. Raporton pri la vivo kaj genia kreaĵo de Zamenhof faris la sekretario de BEA K. Vălev. Ĉar parto de la publiko estis neesperantista, li parolis bulgarlingve. La ĉeestantoj estis forte impresitaj kaj de la granda faro de Zamenhof, kaj de la arda parolado.

La celebrego finiĝis per belarta programo, kiun prezentis E-kursanoj de ing. B. Georgiev kaj Petrova el la konstruista lernejo de Ruse.

Post la celebrego sekvis komuna vespermanĝo en la restoracio de hotelo „Danubo“. Ĉeestis 84 personoj. Du siajn originale verkitajn versaĵojn en Esperanto tralegis la E-veterano Boris Kavalĝiev. Estis dancoj, kantoj. Regis bona amika etoso.

**B. Kavalĝiev**

## AMIKECO, KIU NE MALNOVIĜAS

Ilia amikeco naskiĝis en 1932. La juna esperantisto Atanas Bojaĝiev el la regiono de urbo Omurtag komencis korespondi en Esperanto kun Miĥail Aĥotin — instruisto en la elementa lernejo de v. Rakaŝevo, Tatara ASSR.

En cara Bulgario estis danĝere ricevi leterojn el la unua en la mondo socialisma lando, sed Atanas Bojaĝiev, aktivulo de la instruista sindikata opozicio, brakuminta jam la progresemajn ideojn, soifis ekscii laŭeble pli multe pri la vivo en Sovetunio. La leteroj portis ĝojon al ambaŭ amikoj. Aĥotin skribis pri la entuziasmo, kun kiu la sovetaĵ homoj konstruis la novan socion, pri la vivo de la kolĥozanoj, sendadis al li la ĵurnalojn „Pravda“ kaj „Izvestija“, la gazetojn „USSR na Strojke“, „Ogonjok“, „Bezbojnik“ (en Esperanto). Bojaĝiev montris ilin al siaj kolegoj, legis iujn artikolojn al la vilaĝanoj. En siaj leteroj li rakontis pri la peza vivo de la bulgaraj vilaĝanoj kaj laboristoj.

La amikoj daŭrigis sian korespondadon ankaŭ dum la tempo de la fama Leipzig (Lajpcig)-proceso kaj la ekzemplo de Georgi Dimitrov entuziasmigis ilin. Sed la ligoj de Bojaĝiev kun la soveta esperantisto ne restis kaŝitaj por la polico. Ĝi avertis lin ĉesigi la korespondadon. Tiam la amikoj trovis alian vojon por subteni siajn ligojn. Helpis ilin la progresema franca instruisto Romeo Brisse (Brise), kiu ricevadis la leterojn de Bojaĝiev, metis ilin en novan koverton kaj sendis ilin al Sovetunio. La leteroj de Aĥotin al Bojaĝiev ankaŭ pasis tra Francujo.

Eksplodis la Dua Mondmilito. Por la sovetaĵ homoj venis pezaj tagoj de suferoj kaj heroeco. Ĉiu el la du amikoj enviciĝis — laŭ

la kondiĉoj en sia lando — en la batalon kontraŭ la faŝismo. Aĥotin partoprenis aktive la Patrujan Militon kontraŭ hitlerana-faŝisma Germanio. Li trairis la vojojn de la milito tra Pollando kaj atingis Berlinon. Lia brusto dekoriĝis per ordenoj kaj medaloj. . .

La faŝismo estis frakasita, komenciĝis la paca vivo. Libera Bulgario ekmarŝis laŭ la vojo de socialismo. Ĝi komencis lerni de sia pli granda frato — Sovetunio.

Atanas Bojaĝiev ne forgesis sian sovetan amikon. Serĉante manieron kontakti kun li, li skribis al la Urba Komitato de KPSU en urbo Ĉistopol, USSR, kun peto, ke oni eksciu la sorton de Aĥotin, eltrovu lin. Kaj nur post kelkaj monatoj venis granda surprizo, granda ĝojo — Bojaĝiev ricevis leteron de Aĥotin mem. Denove komencis flugi leteroj de Bulgario al Sovetunio, de Sovetunio al Bulgario, sed jam libere, senkaŝe de kiu ajn. Aĥotin esprimis deziron renkontiĝi kun Bojaĝiev, tiu lasta, ankaŭ longe revinta pri tia renkontiĝo, akceptis kun ĝojo la proponon de sia amiko kaj sendis al li invitolon viziti Bulgarian.

La komencaj tagoj de la pasintjara oktobro alportis grandan ĝojon en la familio de Bojaĝiev: en Ŝumen alvenis gaste Aĥotin. 43 jarojn post sia neĉeesta interkonatiĝo la du amikoj unuafoje renkontiĝis. La bulgara esperantisto montris al sia soveta amiko la belaĵojn de novigita Bulgario, konigis al li la riĉan historian pasintecon de sia popolo. Aparte emociaj estis la renkontiĝoj kun kontraŭfaŝismaj batalantoj el la regiono de Omurtag. Iujn Aĥotin konis foreste — el la leteroj de Bojaĝiev. Nun li havis la eblon persone konatiĝi kaj interparoli kun ili.



La gastado de la soveta esperantisto estis festo ne nur por Bojaĝiev, sed ankaŭ por ĉiuj esperantistoj de Ŝumen. La renkontiĝo kun li okazis en unu el la salonoj de la Junulara Domo. Ambaŭ amikoj emocie rakontis pri sia multjara sincera kaj fidela amikeco, pri la jaroj de laboro kaj batalo. Aĥotin jam estas emerito. Li loĝas en vilaĝo Melniĉnoe, regiono de Krim. Aktiva sociaganto, li membras en la

societo por disvastigo de sciencaj konoj, organizas Esperanto-kursojn.

La renkontiĝo kun la soveta gasto restos por ĉiam en la koroj de la esperantistoj de Ŝumen. La bukedoj el freŝaj aŭtunaj floroj, kiujn ŝumenanoj enmanigis al Aĥotin, estis esprimo de amo kaj estimo ne nur al li, sed ankaŭ al ĉiuj sovetaĵoj.

*Cvjetko Todorov*

# TRA LA E★ MONDO

## VIGLA ESPERANTO-VIVO EN POLTAVA

De jaro al jaro vastiĝas kaj firmiĝas la internaciaj ligoj. La Lenin-ideoj pri paca kunekzistado de ŝtatoj sendepende de ilia politika sociordo, kaj la potenca movado de la laboruloj de ĉiuj landoj por paco elvokas ĉiam pli kreskantajn bezonojn de kompreniĝo inter la popoloj. Kreskas la rolo de la lingvo. „La lingvo, — laŭ la determino de Lenin, — estas la plej grava rimedo de homa komunikado“ (Verkoj, volumo 20, paĝo 338).

Sed se en la pasinteco por vasta internacia komunikado sufiĉis scipovo de du aŭ tri lingvoj, nun jam kelkaj fremdaj lingvoj ne sufiĉas. Tamen tute sufiĉas unu lingvo — Esperanto, kiu ĉiam pli disvastiĝas en la tuta mondo, inkluzive ankaŭ en nia lando.

En la vicoj de la plej aktivaj en Sovetunio jam kelkajn jarojn estas la poltavaj esperantistoj. En 1975 j. en la konkurado de la E-klubo en nia patrujo ni okupis la kvaran lokon, cedinte nur al la plej fortaj kluboj de Ufa, Riga kaj Birnau kaj lasinte malantaŭe la aliajn ukrainiajn E-klubojn: Ĥarkov — sur la 8-a loko, Kiev — sur la 25-a, Ĥmelnickij — sur la 30-a ktp.

Fruktodone laboras la E-klubo ĉe la fakultato de sociaj profesioj de la Poltava Agrikultura Instituto (prezidanto de la klubo — la studento Anatolo Kolesnik, gvidanto — la ĉefinstruisto de angla lingvo Viktor Noĉovkin), kies dekjaran jubileon oni celebros en februaro 1976, kaj la E-sekcio ĉe la Teknika Lernejo de Soveta Komercio (la sekcio gvidas la instruistino de angla lingvo Olga Ŝnalko).

La esperantistoj ĉiusemajne aktivas en kursoj, aranĝas E-ekspoziciojn, fotomuntaĵojn kaj standojn, prelegas pri Esperanto kaj organizas amikecvesperojn kun koncertoj en tiu ĉi lingvo, partoprenas en respublikaj kaj tutniaj

E-renkontiĝoj kaj seminarioj. En Esperanto studentoj prelegas en sciencaj konferencoj. Kaj, kompreneble, korespondas kun samaĝuloj. La poltavaj esperantistoj havas amikojn sur la tuta planedo.

La Urba Komitato de Komsomolo subtenis la iniciaton de E-entuziasmoj fondi urban E-klubon de altlernejoj studentoj, lernantoj de teknikaj mezlernejoj kaj laboristoj. La ĉefa tasko de tiuj ĉi kluboj estas kune kun la kluboj de internacia amikeco evoluigi kaj profundigi la ligojn kun eksterlandaj samaĝuloj pere de E-korespondado.

Tion antaŭis granda klariga kaj propaganda laboro. En interparoloj kaj lekcioj la esperantistoj rakontis al la junularo pri la lingvo Esperanto kaj ĝia signifo por la nuntempa homo. Komence kun la sekretarioj de komso-molaj organizaĵoj kaj poste kun la superaj pionirgvidantoj de mezlernejoj okazis vastaj klarigaj interparoloj, post kiuj ili mem komencis propagandi Esperanton en siaj laborlokoj. Por helpi ilin la Urba Komitato de Komsomolo dissendis afiŝon-anoncon kompilitan de E-aktivuloj. Kelkaj gazetoj de la regiono publikigis artikolojn pri Esperanto. La regiona radio envicigis ŝatatan de la radioaŭskultantoj disaŭdigon „Mia rakonto pri la Internacia Lingvo“ kun originalaj scenetoj, ĝustalokaj komentoj kaj alvoko al la junularo studi Esperanton.

Ĉio ĉi kontribuis al tio, ke multaj kun granda deziro komencis studi Esperanton. Tiel, sukcese ekposedas la lingvon lernantoj, gvidataj de Vasilij Stajkov el la mezlernejo numero 23, kaj de naŭklasanino de la mezlernejo n-ro 8 Tatjana Barabaŝ. Bedaŭrinde, ial ne ĉie kaj ie nesufiĉe oni atentis la disvastigon kaj utiligon de Esperanto. Tial mi deziras me-



morigi la vortojn de la fama verkisto, internaciisto kaj arda pacbatalanto Henri Barbusse (Anri Barbjus): „Internaciistoj, estu logikaj ĝis fino ne nur en viaj pensoj, sed ankaŭ en viaj agoj, studu Esperanton. Faru pli multe: organizu grupojn kaj kursojn por instrui ĝin al aliaj. Estu lernantoj kaj poste ankaŭ instruistoj de la aboco de l'internaciismo“. Ja kiel diris L. N. Tolstoj „tempon por studado de tiu ĉi lingvo oni bezonas tiel malmulte, sed la utilo de ĝi estas tiel granda, ke ne estas eble ne fari tiun ĉi provon“.

*Vasilij Grigorenko,*

*gvidanto de la urba E-klubo de lernantoj en Poltava*

## KONCIZE

En Miass, regiono de Ĉeljabinsk, okazis E-renkontiĝo de 4 urboj de Uralo. Ĝi estis dediĉita al la naskiĝtago de Zamenhof. Estis prelego pri lia vivo kaj agado, recitaĵoj kaj kantoj de kaj pri li. Oni aŭskultis ankaŭ informojn pri la E-agado en USSR kaj rakonton pri veturado al Japanio, projekciis E-filmojn ka.

La renkontiĝo finiĝis per koncerto.

*T. Koptjagina*

\* \* \*

Lige kun la Internacia Jaro de la Virino la esperantistoj en la pola urbo Szczecin (Ŝĉeĉin) organizis vesperon dediĉe al la latva Esperanto-poetino Ljudmila Jevsejeva. Versaĵojn de Jevsejeva legis Stefania Palica. La ĉeestantoj sendis komunan salutleteron al la poetino, loĝanta en Riga.

\* \* \*

En „Informilo“ — bulteno de la Esperanto-Sekcio ĉe „Klubo de la Amikoj de Unesko“ en Barcelona (n-ro 58/1975) aperis informo de Jakobo Aragay pri la vizito de la E-verkistino el Sofio Nevena Nedelĉeva en la „restadejo“ en Monistrol de Monserrat kaj en la menciita klubo. Kiel siatempe ni sciigis, Nedelĉeva gajnis I-an premion en literatura konkurso pri unuaktaj teatraĵoj kaj estis premiita per unumonata restado en Hispanio.

En sia duonpaĝa artikolo J. Aragay donas informojn pri la lernejoj, infan-ĝardenoj kaj muzikarto en Bulgario, pri la bulgara lingvo kaj la „lando de la rozoj“ — Bulgario, k. a.

## „NI KONSTRUU TRAKTORON!“

... Estis 1929 — la unua jaro de la Unua Kvinjara Plano. La impeto de la konstruitmo atingis nekonatajn skalojn — oni starigis ne nur novajn uzinojn, sed ankaŭ tutajn urbojn, estis konstruataj fervojoj, la vilaĝanoj unuigadis sin en kolĥozoj, ĉiumonate kreskis la kvanto de agrikulturaj maŝinoj.

La aŭtunon de 1919 en la bulteno de CK de la Sovetrespublikara E-Unio aperis alvoko de la E-grupo en Brjansk pri kolektado de mono fare de la esperantistoj por konstruo de traktoro. La alvokon entuziasme akceptis ĉiuj E-organizoj en la lando.

En tiu ĉi neordinara tempo, kiam oni faris kalkulojn ne pri jaroj, sed pri monatoj, tagoj, horoj, neniu en la lando povis stari flanke de la konstruado de nova vivo. „Ni konstruu nian traktoron!“ — tiun sloganon oni povis legi en multaj lokaj grupoj de SEU.

En decembro komencis enkasiĝi la unuaj monhelpoj. Samtempe kun ili alvenis ankaŭ reeĥoj el eksterlando. „Tiu ĉi kolektado de monrimedoj estas afero ne nur de la sovetaj kamaradoj, — skribis laboristoj el Nov-Jorko, — sed tasko de la proletaj esperantistoj el la tuta mondo“.

Libervolaj monrimedoj venis el diversaj anguloj de Sovetunio, de laboristoj el Usono, Aŭstrio, Germanio, Ĉeĥoslovakio ka. Sur la malproksima, tiam malmulte konata insulo Kuba la kolektadon de monrimedoj organizis membro de la internacia organizaĵo de esperantistoj-laboristoj. Tiu kamarado pro konspir-konsideroj fiksitis nur sian membro-numeron. En aprilo 1930 la sumo, necesa por konstruo de traktoro, estis kolektita kaj en la maja numero de la bulteno la redakcio sub titolo „Nia unuamaja donaco al la Lando de la Sovetoj“ povis anonci sukceson de la iniciato. „Laborista Esperantisto“ — tiel oni decidis nomi tiun ĉi traktoron, por kies konstruo monhelpis la progresemaj esperantistoj el la tuta mondo.

Malgraŭ ke la komenca celo estis realigita, la alveno de monrimedoj ne ĉesis. Venis novaj sumoj de laboristaj grupoj el Madrido, Francio, Rumanio, Pollando kaj aliaj landoj. La komenca slogano estis anstataŭigita per nova, internacia: „Ĉiuj fortoj — helpe al Soveta Rusio!“ La kolektado de monrimedoj por la unua en la mondo proleta ŝtato daŭris plu. . .

*M. Belogolovskij*  
(El. Ĵ. „Sovetskaja Molodjoĝ“,  
5. X. 1975, Riga)

## GEAMIKOJ EL LA TUTA MONDO!

Sendu al nia lerneja muzeo nacilingvan, eldonitan en via lando verkon de la granda pola verkisto Henryk Sienkiewicz (patrono de nia lernejo). Danke ni sendos al vi la libron en Esperanto.

De via helpo multgrade dependas la E-agado en nia lernejo.

Librojn sendu je adreso: STANISLAW SMIGIELSKI, UL. PIRAMOWICZA 36(L. O.), 47—200 Koźle, POLLANDO.



D-ro M. J. Isaev<sup>1</sup>

## PRI LA BAZAJ METODOLOGIAJ PROBLEMOJ DE LA INTERLINGVISTIKO

### I

La socialisma ŝtato estas konstruata surbaze de certaj sciencaj konkludoj. Tio rilatas ankaŭ al la sociaj kaj politikaj aspektoj de la partia gvidado. Pro tio la sovetaj interlingvistoj atribuas gravan signifon al la ellaboro kaj ĝustigo de principaj tezoj de interlingvistiko kaj esperantologio.

Mi jam raportis kaj skribis pri kelkaj el tiuj tezoj<sup>2</sup>. Permesu al mi rememorigi nur la plej gravajn problemojn.

Ni bazas nin sur la marksisma-leninisma tezo pri la tuthomara unueco en la estonteco.

Rilate al tiu perspektivo V. I. Lenin indikas: „La celo de la socialismo estas ne nur la forigo de disereco de la homaro je etaj ŝtatoj kaj ĉiu formo de izoligo de la nacioj, sed ilia kunfandigo“. Memkompreneble, tio ne signifas senspuran disvolvigon de unuj nacioj en aliajn. Kreiĝinta tuthomara unueco, sendube, ensorbos en sin ĉiujn eternajn valorojn, ellaboritajn de ĉiuj nacioj. Tiamaniere la multkolorco de la kulturo ne malaperos, sed ankoraŭ plimultiĝos.

Dum la lastaj jaroj en la soveta scienco multiĝis la teoriaj esploroj, dediĉitaj al la universala lingvo. Tiu problemo altiras ĉiam pli kaj pli grandan atenton de la sciencistoj. Tiel, ekzemple, akademiano B. G. Gafurov skribas: „Konekse kun la transiro de socialismo al komunismo nin interesas la problemo de la plua interproksimiĝo de nacioj en USSR kaj ankaŭ la problemo de estonta kunfandigo de nacioj kaj la formiĝo de unueca lingvo“.

Tiun problemon traktas multaj scien-

cistoj. Iliaj opinioj grupiĝas en du kontraŭaj tezoj. Iuj asertas, ke estonta lingvo de la homaro iĝos unu el la naciaj lingvoj. Aliaj supozas, ke tia lingvo povas esti nur artefarita, ensorbinta en sin la plej bonajn trajtojn de la naciaj lingvoj. La adeptoj de ambaŭ konceptoj, ĉiu laŭ sia maniero, argumentas sian pozicion.

Tiel, la konata lingvosciencisto A. A. Reformatskij asertas, ke la internacia lingvo povas formiĝi nur dum la paso de la historio surbaze de realaj naciaj lingvoj, kio estas ligita kun la evoluo de novtipaj nacioj.

Alia grupo de sciencistoj supozas, ke estonta universala lingvo povas esti nur konscie konstruita kaj riĉigita je la konto de naciaj kaj interpopolaj lingvoj. Al tio profesoro V. G. Kostomarov aldonas, ke povas okazi, ke iam la homoj kreos tre perfektan artefaritan lingvon kaj sen bedaŭro rezignos je naturaj lingvoj.

Kelkaj sciencistoj allasas la eblecon solvi la problemon de universala lingvo kiel pere de natura lingvo, tiel ankaŭ pere de artefarita lingvo, ne antaŭdifinante la iron de la historio mem (profesoroj S. T. Kaltaĥĉjan, J. D. Deŝeriev, J. F. Protĉenko, P. M. Rogatĉev, M. A. Sverdlin k. a.). Sendube, sub la kondiĉoj de intensa evoluo de la scienco, tekniko kaj kulturo la popolaj amasoj ne povas permesi al si la lukson vane elspezi tempon kaj energion. La studo de multaj lingvoj dum samtempa ekzisto de unu tutmonda lingvo, akumulinta en si la meritojn de diversaj naciaj lingvoj kaj posedanta pli altan informecon, estas tia vana elspezo.

Certa parto de sciencistoj ĝenerale



konsideras ne necesa okupigi pri la problemo de universala lingvo. Ili supozas, ke mankas premisoj por studi tiun problemon (prof. V. A. Avrorin).

Kompreneble, oni ne povas malpermesi al iu okupigi pri problemoj de la fora estonteco. Tamen la ĉefa linio en la problemo estas la klarigo de principa magistrala vojo. Ĝi estas la *malproksima prognozado*. En ĝi, ni emfazas, gravas la principa klareco. Tio helpas al ni pli bone orientigi en la komplikaj pasantaj procedoj kaj ilia plua direkto.

Tamen ekzistas ankaŭ *proksima estonto*. Ĝin necesas studi laŭeble plej detale por esti en la stato optimummaniere regi la iron de la eventoj. Kaj jen ĉi tie paralele kun la problemoj de la naciaj lingvoj viciĝas ankaŭ la problemo de la *internacia helplingvo*.

## II

La interlingvistiko estas parto de la lingvistiko kiel scienco. Pro tio ni devas ĝuste scii ne nur niajn proprajn interlingvistikajn problemojn, sed ankaŭ koni aliajn ĝeneralajn problemojn de la lingvoscienco. Inter ili estas kaj pure teoriaj, kaj ankaŭ praktikaj problemoj. La plej gravaj estas, laŭ mia opinio, la praktikaj.

Ĝis nun ni menciis la aspektojn de la universala lingvo de la estonto kaj revuis la taskojn de internacia artefarita helplingvo. Sed por la temo de nia raporto estas grave ankaŭ lumigi la problemojn de la naciaj kaj interpopolaj lingvoj.

Permesu al mi nur, kompreneble, teze prikonsideri la problemojn surbaze de lingvaj materialoj de Soveta Unio, kiu estas unu el la plej multnaciaj ŝtatoj en la mondo. Sur ĝiaj grandegaj areoj loĝas pli ol 130 popoloj. Ili havas siajn proprajn lingvojn, kiuj apartenas al diversaj lingvofamilioj: hindoeŭropa, altaĵa, kaŭkaza, finna-ugra, paleoazia kaj kelkaj izolaj.

Tuj post la Granda Oktobra Socialisma Revolucio estis ellaborita vasta

programo por plialtigi la ekonomian kaj kulturan nivelojn de la postrestintaj nacioj. Antaŭ ĉio, tamen, estis necese krei nacian literaturon en la gepatraj lingvoj. Obstaklo al tiu kreo estis la foresto de alfabetoj ĉe absoluta plejmulto de la popoloj. Literaturan tradicion havis nur 20 lingvoj. La tasko de plibonigo de la ekzistantaj alfabetoj kaj la kreo de alfabetoj por senalfabetaj popoloj fariĝis en la komenca tempo de la Soveta Ŝtato la plej ĉefa okupo de lingvosciencistoj kaj kulturaktivuloj. La agado pri alfabetoj komplikiĝis pro la treege diversa bildo de la lingva vivo de la popoloj: iliaj lingvoj, apartenantaj al malsamaj generezaj grupoj, tre diferencas ankaŭ laŭ siaj strukturoj kaj laŭ la amplekso de la sociaj funkcioj. La soveta lingvosciencistoj sukcese solvis tiun honoran, sed tre malfacilan taskon. Rezulte de ilia skrupula laboro dum tre mallonga historia tempo pli ol 50 popoloj ricevis literaturajn lingvojn.

Huntempe la laboroj de la lingvosciencistoj estas ligitaj kun la plua perfektigo de la literaturaj lingvoj:

1. estas plibonigataj la alfabetoj kaj ortografioj;
2. oni fajnigas la lingvajn normojn, precipe en la novkonstruitaj lingvoj;
3. estas ellaborata necesa terminologio;
4. fine, la lingvosciencistoj sekvas problemojn, ligitajn kun la lingva kulturo kaj la observo de la lingva normo.

Apartan lokon en la agado de la lingvosciencistoj okupas la problemo de bilingvismo, karaktera por multnacia ŝtato. En nia lando la plej grava formo de bilingvismo konsistas en tio, ke ĉiuj popoloj uzas sian nacian lingvon interne kaj por interpopolaj kontaktoj — la rusan. Por tio ekzistas objektivaj historiaj kaŭzoj.

Unue. La rusoj nombras ĉirkaŭ 55% de la loĝantaro de USSR.

Due. La rusoj loĝas en ĉiuj regionoj de la lando.

Trie. En la revolucia kaj kultura movadoj la reprezentantoj de la rusoj

okupis avangardan pozicion.

Tamen la lingvo de interpopolaj kontaktoj tute ne egalas al ŝtata lingvo. Kiel oni scias, la ŝtata lingvo estas deviga, dum la interpopola lingvo jure havas neniun avantaĝon antaŭ ajna alia lingvo. Ĉiu nia civitano rajtas adresi sin al ajna institucio en sia gepatra lingvo aŭ en alia lingvo, por li oportuna.

Sekve, ĝuste komprenataj naciaj interesoj ne kontraŭas al la ekzisto de interpopola lingvo. Niaj popoloj, edukitaj en la spirito de amikeco kaj estimo al aliaj nacioj, optimume uzas ĉiujn eblecojn de bilingvismo.

La lingvaj problemoj havas siajn specifojn en ĉiu lando. Kaj ni ne devas forgesi, ke la problemoj de interkomunikado estas tre diversaj kaj tre komplikaj. Ili prenas diversajn formojn depende de la socia vivo, agado kaj evoluo. Pro tio nia tasko estas serĉi solvojn en la apliko de diversaj sistemoj de kompreniĝo. Nia principo devas esti „kaj-kaj“, sed ne „aŭ-aŭ“! Jen tio signifas:

- estu multnombraj naciaj lingvoj!
- estu la interpopolaj lingvoj!
- estu la mondaj lingvoj (rusa, angla, franca, hispana, araba, ĉina)!
- kaj estu ankaŭ la internacia helplingvo!

### III

Jen estas la plej gravaj vidpunktoj kaj la lingva situacio, kiuj determinas la karakteron kaj la konkretajn esploraĵojn de la sovetaĵ esperantistoj.

En la kadro de Lingvosciencia Instituto de la Soveta Scienca Akademio estas organizita speciala interlingvistika grupo. Ĝi jam preparis kolekton de artikoloj, kiu devas aperi dum tiu ĉi jaro (1975 — noto de Red.).

La enhavo de tiu unua kolekto estas: Antaŭparolo (direktoro de la Lingvosciencia Instituto de la Akademio de Sciencoj de USSR, V. N. Jarceva).

1. M. J. Isaev, E. A. Bokarev kaj la interlingvistiko

#### I. Ĝeneralaj interlingvistikaj problemoj

2. E. A. Bokarev, La nunepoka stato de la problemoj de internacia helplingvo (la faktoj pri Esperanto)
3. E. A. Bokarev, Pri la internacia lingvo de la scienco
4. M. J. Isaev, La problemoj de artefarita lingvo por la internacia komunikado
5. V. P. Grigorjev, La artefaritaj helplingvoj kiel interlingvistika problemoj
6. D. L. Armand, La homaro kaj la oceano de informado

#### II. Tipologio kaj evoluo de la internaciaj artefaritaj lingvoj

7. S. N. Kuznecov, Pri tipologia klasifiko kaj internaciaj artefaritaj lingvoj
8. D. Blanke, Pazigrafioj
9. N. F. Danovskij, La evoluo de Esperanto

#### III. Interlingvistiko kaj lingvokonstruado en Rusio

10. A. D. Duliĉenko, El la historio de la interlingvistika pensado en Rusio (ĝis la XIX jarcento)
11. L. L. Vasilevskij, Nekonata paĝo el la historio de la patrolanda interlingvisiko (1925)
12. D. G. Baev, Artefarita helplingvo Akciom Variant

Dua kolekto ankaŭ estas preparata. Ĝi verŝajne aperos en 1976. Krome laŭ plano nia grupo devas dum la sek

<sup>1</sup> D-ro M. J. Isaev estas doktoro de filologiaj sciencoj, gvidanto de la Interlingvistika Grupo ĉe la Lingvosciencia Instituto de la Scienca Akademio de USSR, prezidanto de la Esperanto-Komisiono ĉe SSOD. Ĉi prelego estas farita en Melnik, ĈSSR, en aprilo 1975.

<sup>2</sup> Komparu interalie:

— la lastan ĉapitron de la libro „Jazyk i nacija“ (Lingvo kaj nacio) de A. T. Baziev kaj M. J. Isaev, Moskvo (Nauka), 1973. La traduko de ĉi tiu ĉapitro aperis en „Paco“ 1, 2/1974.  
— la prelegon de d-ro M. J. Isaev „La rolo de la sciencisto en la evoluo de la lingvo“ enkadre de ISU en la 59-a Unirersala Esperanto-Kongreso en Hamburg, 1974.



vontaj 3—4 jaroj ellabori pli grandan kolektivon verkon — „La problemo de artefarita helplingvo“.

Ni ankaŭ planas eldoni lernolibron por la rusa lingvo en Esperanto. Sendube tiu scienca esplorado estas grava por la Esperanto-movado, ĉar ĝi informas vastajn rondojn de gvidantoj kaj politikistoj pri la Esperantaj problemoj.

En tiu plano por ni estas grava ankaŭ la laboro interlingvistika kaj esperantologia, la sukcesoj en la frataj

socialismaj ŝtatoj. Oni povus diri, ke ni ĉiuj faras gravan aferon. La sukcesoj de unu el ni estas samtempe sukcesoj de ĉiuj ni.

Ĉio ĉi, tamen, ne signifas, ke ni en Soveta Unio ne preparos science verkatajn dokumentojn por la superaj organoj. Mi deziris nur diri, ke komence ni estas okupitaj per sciencaj laboroj, kiuj estos ankaŭ bazoj por similaj dokumentoj.

## ***Ekkonu la kutimojn de nova lando***

### **PAPULANDO-NOVGVINEO — UNU EL LA PLEJ JUNA ŜTATOJ**

La 16-an de septembro 1965 super la orienta parto de insulo Novgvineo, unu el la plej grandaj insuloj en la mondo, troviĝanta inter la ekvatoro kaj Aŭstralio, kaj super ducent aliaj insuloj ekflirtis nigra-ruĝa flago kun la bildo de flava paradizbirdo kaj la kvin steloj de la Suna Kruco. Tiu flago estas la simbolo de la juna ŝtato Papulando-Novgvineo.

La nova ŝtato havas tersurfacon de 475 000 kvadrataj km kaj loĝantaron de ĉ. 2,7 milionoj da homoj, kiuj, escepte de 50 000 blankuloj, estas papuoj kaj melanezianoj. La indiĝenoj parolas papuajn lingvojn kaj la komunan lingvon „piĝin“, kiu por ili plenumas la rolon de Esperanto. Oficiala lingvo estas la angla. La ĉefurbo estas Port Moresby (Port Moresbi) kun ĉ. 100 000 loĝantoj. Laŭ la konstitucio la nova ŝtato, liberiĝinta elsub dependeco de Aŭstralio, estas dominio de Britujo.

Ĝis la koloniigo de la lando en ĝi estis konservita la genta-komunuma sociordo. Kun la koloniigo komenciĝis ĝia disfalo, sed en la vilaĝoj ĝi estas preskaŭ netuŝita ĝis nun. Dum la lastaj 15 jaroj en la lando okazis gravaj ŝanĝoj. Kreiĝis urba loĝantaro, kiu kreskis rapide. La virinoj jam eliris el la miljara sklaveco. Papulando-Novgvineo havas jam sian universitaton kaj teknikan universitaton. La montaraj papuoj ĝis antaŭ du jardekoj havis kiel unikan agrikulturaĵon la dolĉan bataton, sed hodiaŭ ili kultivas ankaŭ kafon, peretron, kakaon, kaŭĉukon, teon, kopron k. a.

Bazo de la mastrumo estas la agrikulturo. Ekzistas tamen grandaj subteraj riĉaĵoj: fero, kupro, nikelo, plumbio, plateno, mangano, zinko, boksito ka. Estas malkovrita ankaŭ petrolo. La lando havas riĉajn hidrofontojn kaj grandajn rezervojn de gaso.

La pliboniga plano de la registaro antaŭvidas pli justan distribuon de la ekonomiaj profitoj, kontrolon super la ĉefaj sektoroj de la nacia mastrumo, unualoke de la naturaj rimedfontoj, planadon kun akcento sur la disvolvigo de la agrikulturo kaj la ligita kun ĝi

industrio. En la plano estas antaŭvidita investo de fremdlanda kapitalo, tamen la registaro avertas, ke ĝi ne povas baziĝi sur la malkara laboro de la indiĝenoj. La registaro samtempe deziras konservi tion, kio estas konsiderata kiel plej bona en la vivmaniero de la popolo.

\* \* \*

Okaze de la akiro de sendependeco de Papulando-Novgvineo „Bulgara Esperantisto“ publikigas mallongigite la lastan ĉapitron de la libro „Kanaĉo el Kananam“, originale verkita en Esperanto de la aŭstralia esperantisto Kenneth G. Linton — eksa prezidanto kaj nuna vicprezidanto de la Aŭstralia E-Asocio. Dum la Dua Mondmilito li pasigis tutan jaron inter la indiĝenoj de la malmulte konata, sed tre interesa insulo. Linton priskribas ilian vivon kaj strangajn — laŭ la vidpunkto de la eŭropanoj — morojn kaj kutimojn, ankaŭ la fantazie belan naturon de Novgvineo.

En Novgvineo la aŭtoro lernis piĝinon, kiu malfermis al li la pordon al amikeco kun la indiĝenoj. Inter ĉi tiuj homoj li trovis verajn amikojn, „frathomojn, kiuj sentas la samajn timojn kaj dolorojn, la samajn ĝojojn kaj amojn kiel ĉiuj aliaj homoj“, kiel li mem diras en la antaŭparolo de la libro.

La aŭtoro pruvis, ke la blankuloj „povas havi spiritajn fidligojn kun homoj de malsama haŭtkoloro certe ne malpli facile kaj firmbazol kun eŭropanoj“. Tion pruvis antaŭ unu jarcento ankaŭ la fama rusa vojaĝanto kaj esploranto-humanisto Mikluĥo-Maklaj dum siaj geografiaj kaj etnografiaj esploroj en la jaroj 1871-72 kaj 1876-77, faritaj preskaŭ en la sama loko, kie Linton renkontiĝis kaj amikiĝis kun novgvineanoj.

La libro de Linton estas refuto de la venenaj rasismaj teorioj, kiuj estas disvastigataj ankaŭ en la patrujo de la aŭtoro.

Parolante pri la libro, ni ne povas ne menci la kolorplenan kaj nuancoriĉan lingvaĵon de la aŭtoro, lian bonegan stilon.

*D. Haĝiev*



## LA EDZIĜO DE LABADU

Kia memorinda okazaĵo estis la edziĝo de Labadu!

Jam frumatene, kiam mi vizitis la vilaĝon per la bargo, ĉiuj vilaĝanoj pretigis donacojn, kiel oni kutimas fari ĉe indiĝena edziĝo. Laŭdante al sia kunulo la altan kvaliton de sia donaco, oni diskutis ĝian taŭgecon por la ricevonto kaj konjektis pri la donaco nepre ricevota interŝanĝe.

Labadu, estante la edziĝonto, devis fari donacojn al ĉiuj membroj de la familio de la fianĉino. Li jam donacis al Kamia la aprojn kaj ankoraŭ nun sin okupis pri skatoloj da hundodentoj, oleo kaj konko moneroj, kiujn li devis aĉeti aŭ prunte akiri de parencoj kaj aliaj vilaĝanoj. Lia plej malfacila tasko estis akiri sufiĉan „toba-n“ (tolon) por ornamisian fianĉinon.

Tolo estas la plej alte taksata trezoro inter la indiĝenoj, sed neniuj kuraĝas longe teni materialon tiel pereeman inter la tropikoj. Tial nur fianĉino iam portas tolon.

Antaŭ la edziĝo la viro devas akiri tolon ĉie, kie li povas, ofte entreprenante longajn vojaĝojn. Pro la tolo li kutime faras ŝuldojn tute nepageblajn, ĝis edziniĝos lia propra filino, kiam li ricevos tolon de ŝia estonta edzo.

Post la edziniĝo de la filino la patro devas redoni la tolon kiel eble plej rapide, aŭ pagante la ŝuldojn akiritajn ĉe sia propra edziĝo, aŭ kreante krediton por la estonta edziĝo de sia filo. Multaj filoj faras sian patron fieran, sed multaj filinoj faras lin riĉa.

Ĉe la strando kuŝis multaj fremdaj kanotoj jam portintaj al la grava okazaĵo vizitantojn, kiuj miksiĝis kun la kanamanoj, kaj interŝanĝis donacojn ĉirkaŭite de la ĉenoj da cipreoj, hundodentoj kaj vespertodontoj pendantaj sur ŝnuroj ligitaj inter la domoj. La babilada muĝo gradon post grado kreskis pro la konstante alvenantaj pa-

rencoj, najbaroj kaj amikoj.

Oni babiladis, ridis, argumentis, marĉandis, ekzamenis, eniris domojn kaj eliris, interŝanĝante familiajn heredaĵojn tre antikvajn. Kelkaj pretigis fajrojn por rosti la aprojn por la edziĝa festeno, dum junuloj kantis kaj dancis je la ritma takto de tamburoj. La kutime trankvila vilaĝo nun dronis en bruoj kaj moviĝo. Kiel ŝanĝiĝis tiu vilaĝo por mi dum nur unu jaro!

Post tagmezo mi forlasis la festantan Kananam veturigante per bargo al Tagasa la parencojn de Labadu, kiuj devis konduki la fianĉinon Silia al Kananam.

„Novgvineanoj devas multe pagi por siaj edzinoj“, mi rimarkis al Langgai, kiu staris apud mi en la bargo glitanta tra la ebena haveneto.

„Ne tro multe, se ili restas fidelaj“.

„Ĉu nefideleco estas kosta afero, do?“

„Ĝi estas tre malfeliĉa afero!“

„Kial?“

„La vilaĝestro punas nefidelecon“.

„Klarigu al mi, Langgai“.

„Kaze de edzina kulpo, la patro de la edzino devas repagi la doton al la edzo. Kaze de kulpo flanke de la edzo, tiu devas unue aĉeti sian liberon de sia edzino, kaj se lia amatino estas jam edzino, li ankaŭ devas aĉeti por ŝi la liberon de ŝia edzo. Krome li devas repagi sian doton al ŝia edzo. Viro povas tre facile bankroti pro nefideleco.“

„Ĉu edzo devas ĉiam pagi doton por sia edzino?“

„Ĉiam. Kaj krome li devas donaci al ĉiuj membroj de la edzina familio. Edziĝo estas multekosta afero.“

„Jes, — mi ridetis, — kaj ne nur en Novgvineo“.

„Kiom kostas en Aŭstralio?“ — demandis min Langgai.

La respondo al tiu demando estis tiel komplika, bezonanta multajn aliajn klarigojn, ke ni atingis Tagasan antaŭ ol mi finis.



En Tagasa mi rimarkis tiun saman ekscitiĝon, kiu nun regis en Kananam. Antaŭ la vilaĝestra domo, kien Langgai kaj Katrina tuj kondukis min, kolektiĝis tre multaj virinoj, inter kiuj mi baldaŭ min trovis, tamen mi jam delonge al kutimiĝis rigardi virinojn portantajn nur herbajn jupejn.

La celo de ĉies atento estis la bela Silia, obeeme turniĝanta laŭ la ordonoj de pluraj virinoj, kiuj pretigis ŝin por la edziniĝo. Ŝia hararo estis tinkturita hele brikruga, dum ŝiaj brakoj, vizaĝo kaj dorso estis oranĝkoloraj.

Ĉirkaŭ ŝiaj brakoj estis volvitaj longaj ĉenoj el konkoj, kaj ĉirkaŭ ŝia talio ŝi portis zonon el hundaj dentoj, sur kiu pendis du pezaj antaŭtuko el konkoj. Ĉirkaŭ ŝiaj mamoj ŝi portis zonon el brilaj sekaj ruĝaj beroj, garantian per multaj strangaj ornamaĵoj.

Kiaj strangaj aferoj ornamis ŝiajn brakringojn? — porcelanaj pipoj, tranĉiloj, forkoj, kuleroj, kombiloj kaj malgrandaj speguloj — fremdaj posedaĵoj, neniam uzataj krom por ornami fianĉinon.

Hirta diademo el hundodentoj sidis sur tiu kapo, kies juna sensulka vizaĝo, kutime tiel ĉarma kaj senornama, kvankam multe tatuita, ridetis rekone al mi, silente suferante la malkomforton de la akraj kaj pezaj ornamaĵoj. La diademo subtenis grandegan kronon el miloj da uranornisaj<sup>1</sup> plumoj, kies belaj koloroj brilis en la sunlumo.

De la streĉitaj lomboj de ŝiaj oreloj, pendis amasoj de la kutimaj hundodentoj, kaj de la longa maldika peco de osto, puŝita tra truon en la vando de la nazo, grapolis granda amaso da hele koloraj konkoj.

Jardoj da komerca tolo, tiel malfacile akiritaj de Labadu por lia amatino, estis drapiritaj ĉirkaŭ ĉi tiu indiĝena belulino, donante al ŝia svelta figuro la aspekton de grandega remburita pupo ĉe foiro. Centoj da koloraj plu-

moj garnis ĉion.

Kiam oni fiksas sur ŝi la specialajn trezorojn de la parencoj de Labadu, por ke ŝi portu ilin dum la ceremonio, ĉio estis preta.

Dum la kananamaj virinoj eskortis Silia-n al la atendanta bargo, la tagasaj junuloj prezentis kolorplenan spektaklon, en kiu ili batalis kontraŭ fiktiva malamiko por malhelpi la foriron de Silia. En siaj maldekstraj manoj la kanakaj militantoj tenis grandajn lignajn ŝildojn ĉirkaŭligitajn per kanaj strioj kaj ornamitaj per la kolorigitaj vizaĝoj de monstroj kaj demonoj. Per siaj dekstraj manoj ili svingis lancojn garnitajn per belaj koloraj plumoj, kaj en siaj buŝoj ili tenis konkajn ornamaĵojn kiel talismanojn kontraŭ malbonaj spiritoj.

Ĉe la akvorando apud la bargo atendis nin Kamia sur kajeto provizore konstruita el kokosarbaj trunkoj kaj kano. Sur ĉi tiu marŝis la peze ŝarĝita Silia, helpate de ŝia patro kaj mi. Neniu bargisto de mezepoka Venecio estis pli fiera transporti belan fianĉinon ol mi estis tiutage.

En la bargo kun mi akompanis Silia-n la kananamaj virinoj kun ĉenoj el hibiskaj floroj ĉirkaŭ ŝiaj koloj kaj plumieraj<sup>2</sup> floroj en la hararoj. Post la bargo sekvis granda procesio da kanotoj plenaj de geknaboj gaje kantantaj kaj vigle frapantaj siajn tamburojn la tutan vojon al Kananam.

Ĉe Kananam atendis nin granda amaso da karnavale vestitaj geknaboj, kiuj hurais, kantis kaj kriegis, dum Silia eliris el la bargo helpate de Kamia kaj mi. Preskaŭ ĉiuj viroj krom ŝildo kaj lanco, same kiel la tagasanoj, ankaŭ portis belegan kapornamaĵon kaj maskon similtan birdon, fiŝon aŭ beston. La grandega masko kaŝanta la kapon de Ugala<sup>3</sup>, la ĝentila sorĉisto de Kananam, precize prezentis la monstran kapon de krokodilo.

<sup>1</sup> *Uranorniso* — belega birdo, populara konata kiel „birdo de paradizo“.

<sup>2</sup> *Plumiero* — tropika arbo kun bonodoraj floroj.

<sup>3</sup> *Ugala* — la sorĉisto.

. . . De la plejmulto de la maskoj pendis aroj da sekaj nuksoj, kiuj klatadis ĉe ĉiu paŝo de la portantoj. La maskoj, kiuj reprezentis variajn ridaĉantajn monstrojn, estis lerte faritaj el tre malpeza ligno bele ornamita per perlamoto, haroj, plumoj, kaj hele kolorigitaj.

Kiam ni eniris la vilaĝon, mi rimarkis, ke kelkaj fajroj ĉe la alia fino de la korto jam arde brulis, rostante la aprojn por la festeno.

Antaŭ la domo de sia patro Labadu kun lanco kaj ŝildo staris statuece kaj senmove.

. . . Kiam Silia alvenis en la centron de la korto, ŝi turniĝis kaj marŝis al la bangalo de Ugala ĉe la fino de la korto kontraŭa al tiu, kie staris Labadu. Atinginte la bangalon, ŝi sidigis sur la benkon antaŭ la konstruaĵo.

Kiam Ugala aperis ĉe la pordo portante sian grandegan krokodilan maskon, oni ekludis strangan ritman melodion. La muziko estis signalo al la homamaso, kiu nun formis rondon, svingante lancojn kaj ŝildojn kaj kriegante, ĝis la tumulto estiĝis preskaŭ surdiga.

En la mezo de la granda rondo dancis la krokodila masko de Ugala, murmurante strangan ritman kanton. Eniris la rondon kaj dancis ĉirkaŭ li sep tagasaj viroj, portantaj groteskajn maskojn, hele kolorigitajn ŝildojn kaj ornamitajn lancojn. La takton donis pli ol cent tamburoj.

Antaŭen paŝis Labadu al la centro de la rondo, kie unu el la sep dancantaj demonoj elpaŝis por renkonti lin. La sekva danco prezentis batalon inter la fianĉo kaj la demono.

Kiam Labadu fine venkis la unuan, dua demono dancis renkonte al li. Post ĉiu venko la ĉeestantaro laŭte hurais. Venkinte la sepan, li alten levis sian lancon kaj laŭte kriegante, kure atakis Ugala-n, kiu turniĝis kaj kuris al sia

domo, en kiun li malaperis.

Kaptinte Silia-n, Labadu fiere ŝin kondukis returne al la centro de la rondo. Nun Ugala reaperis el sia domo kaj dancis al la geedziĝa paro. Trifoje li pompe paŝis ĉirkaŭ Labadu kaj Silia. Subite li haltis, kaj kun li haltis la muziko. Unu paŝon li faris, kaj unu frapo sonis de cent tamburoj. Du paŝojn li faris, kaj du frapoj sonis de la tamburoj. Tri paŝojn — kaj liberiĝis la briditaj emocioj de la homamaso. Ĉiuj ekdancis freneze.

Subite la tamburoj kaj la muziko abrupte ĉesis, kaj kun ĝi ĉesis la bruoj. Ĉiuj retirigis, denove formante liberan rondon, en kies centro ankoraŭ staris Labadu kaj Silia. Post la ĉeso de la moviĝo regis plena silento.

Num aŭdiĝis la monotona voĉo de Ugala dum kelkaj momentoj, sed tuj kiam li ĉesis, la emocioj de la ĉeestantaro denove eksplodis. Ĉirkaŭite de tiu huraanta homamaso, Labadu kondukis sian novedzinon al sia patro, apud kiu li ekstaris, dum tiu anoncis la festenon.

Dum la manĝado nek la muziko, nek la dancado eĉ momenton haltis. Ĉiam kelkaj personoj daŭrigis la dancon, revenante post iom da tempo al la festeno, anstataŭite de aliaj. Gradon post grado la nombro de la dancantoj pliiĝis, ĝis ĉiuj ekdancis. Post sunsubiro la dancantojn lumigis la ankoraŭ arde brulantaj fajroj kaj multaj torĉoj, portataj de la dancantoj, kiuj pli kaj pli emociiĝis sub la influo de la danco kaj konstante maĉata betlo.

Silia, nun liberigita de sia peza ŝarĝo vigle dancis en virina grupo, dum Labadu dancis en vira grupo kun aliaj junuloj. La seksoj ne kune dancas en Novgvineo.

Tiel forpasis horoj. Oni povis facile konstati pro la brilantaj okuloj, ke la emocio de pluraj dancantoj tre alproksimiĝas al histerio. . .





INTERNACIA SEMINARIO „ESPERANTO  
KAJ LA POPULARA MUZIKO“

23—26 de aprilo 1976 — u. Trenčin,  
ĈSSR

Prelegoj kun diskutoj, prezentoj de muzik-  
ensembloj kaj kantistoj el multaj landoj.

Laborlingvo — Esperanto.

Aliĝilojn kaj pliajn informojn petu de;  
ZK MERIMA, 91101 TRENČIN, ĈEĤOSLO-  
VAKIO.

En Taŝkento, Soveta Uzbekistano, forpasis  
la konata malnova meritplena kaj tre aktiva  
soveta esperantisto

**Ignaco kovalevskij**

Li havis multajn korespondantojn en Bul-  
gario kaj la tuta mondo. La bulgaraj espe-  
rantistoj estas precipe dankaj al li, ĉar en daŭ-  
ro de multaj jaroj li estis nelacigebla dis-  
vastiganto de la revuoj „Nuntempa Bulgario“  
kaj „Bulgara Esperantisto“.

**TRA LA GAZETARO**

Ĵ. „*Septembrijsko Zname*“ — Pazarĝik  
(X): „50-jara jubileo“ — informo pri la so-  
lenajo en u. Velingrad okaze de la 50-jara  
jubileo de la loka E-Societo.

Ĵ. „*Ŝumenska Zarja*“ — Ŝumen (9. X):  
„Amikaj leteroj“ — informo de Cv. Todorov  
pri kunveno lige kun la Semajno de la Le-  
tero, anoncita de la Universala Poŝtista Asocio.

En la sama ĵurnalo:

16. X: „Amikeco, kiu ne maljuniĝas“ —  
ampleksa materialo de Cv. Todorov pri la  
amikaj rilatoj inter la soveta esperantisto  
Miĥail Aĥotin kaj Atanas Bojaĝiev el Ŝumen.

20. XI: informo de Cv. Stojanov „Frata  
renkonto“ — pri la gastado de la soveta es-  
perantisto Vjaĉislav Rusĉenko en Ŝumen.

Ĵ. „*Karlovskaja Tribuna*“ — Karlovo (24.  
X): Informo kun foto de M. Sĵupjurdekova  
pri la solenaĵo en la Kultura Domo de Kar-  
lovo lige kun la nova E-lernoĵaro.

Ĵ. „*Rodopski Ustrem*“ — Smoljan (8. XI):  
artikolo „Fruktodona agado“ de Maria Diĉeva  
pri la agado de la Distrikta E-Komitato sur  
la kampo de la internacia turismo.

Ĵ. „*Oteĉestven Front*“ — Sofia (20. XI):  
„En urbo Karlovo oni lernas Esperanton“ —  
informo de Angel Tanjev.

En la sama ĵurnalo:

9. XI: informo „Internacia esperantista ar-  
keologia laborbrigado“ de G. Karakaĉanov pri



E-kurso en Ĥaskovo kun sia gvidantino  
Nedjalka Bojdeva



Celebro de Zamenhof en Tărgoviște (vd. paĝon 6)

la preparaj laboroj por la internacia studenta  
esperantista laborbrigado 1976 en u. Marica.

11. XII: „Instruistaj kursoj pri Esperanto en  
Smoljan“ — informo de M. Georgieva.

Ĵ. „*Dimitrovska Zname*“ — Pernik (5.  
XII): informo „Oni lernas Esperanton“ de Ni-  
kola Mitev pri la eksperimenta E-klaso de la  
instruistino Cvetana Zareva.

Ĵ. „*Srednoŝkolska Zname*“ — Sofia (9.  
XII): informo „La Dua Nacia Konferenco de la  
Mezlernejanj-Esperantistoj“ kaj artikolo „Por-  
do malfermita por la amikoj“ de Lasto Nikov.

Gazeto „*Paraleli*“ — Sofia (10. XII): arti-  
kolo kun fotoj „La distancoj ne malhelpas“  
de Ekaterina Vasileva pri la Bulgara E-Teatro.

Ĵ. „*Septemvri*“ — u. Bjala (10. XII): arti-  
kolo „Lingvo de la paco kaj amikeco“ de Si-  
meon Baltaĝiev.

**Redakta Komitato:** Kunĉo VĀLEV (ĉefredaktoro), Nevenka ALEKSIEVA, Marin BĀCEV,  
Ĥristo GOROV, Asen GRIGOROV, Stefka ĤRISTOVA, Nenko JONKOV, Krĉstju KARUCIN  
Haim LEVI.

**Administra sekretario kaj korektanto:** Minko CONKOVSKI

Sofio, poŝtkesto 66

Tel. 31-00-29

# deziras korespondi

## Bulgario

Nadja Stefanova — ul. Prosveta 5, *Haskovo*.  
(kun ĉl — kor. kaj interŝanĝi insignojn, pm).

Borjana Petrova — ul. Akademik Metodi Popov 7, vĥod A, *Sofio* 13 (studentino — kun gejunuloj el ĉl)

Zara Velčeva — ul. Kl. Ohridski 11, *Gabrovo* 3 (23-jara bibliotekistino — kun ĉl pri ĉt)

Nina Trendafilova Popova — ul. Gurko 3-a, 4400 *Pazarĝik* (21-jara — pri popola kaj moderna muziko, gr. diskoj, turismo, kino, E-insignoj — en Esperanto, rusa, franca)

Nikola P. Nikolov — 5400 *Sevlievo*, str. Jonko Karagjozov 4 (kun ĉl pri ĉt)

Dimitrinka Dimitrova — 7100 *Bjala*, str. Gavril Genov 20 (kun 15 — 16-jraj geesperantistoj el ĉl)

Maria Peevska — 4230 *Asenovgrad*, str. Iskra 1 (kun ĉl pri muziko, sporto)

Mustafa Mustafov — v. Ĉernookovo, distrikto *Ŝumen* (instruisto — kun ĉl pri ĉt)

Canka Marinova Kostova — 7100 *Bjala*, str. Debâr 13 (15-jara — kun gelernantoj el ĉl)

## Ĉeĥoslovakio

Stanislav Kareš — Tylová 1262, 50805 *Hořice*, Okres Jičín, (pri ĝardenkulturado, floroj, naturo, agrikulturo, vojaĝoj, fotoj k. a.)

Petr Wrona — ul. Dvorokova 260, 74 787 *Erdšov*, okr. Opava (13-jara lernanto)

Ladislav Macháček — *Mikova* 1432, Karvina 6 (20-jara — bk, ŝatanto de klarinet- kaj saksofonludado)

## Francio

Antoine Scicluna — 7, rue Costes & Belicte, 16 100 *Cognac* (50-jara — kun samaĝuloj el ĉl)

## GDR

Otto Laucknes — Robert. Blum-str. 9, 828 *Grossenhain* (interŝanĝas pm de GDR kontraŭ anglaj pm)

40 diversaĝaj (plej parte junuloj) esperantistoj — kun ĉl pri ĉt. Komuna adreso: Laborrondo Esperanto en la Kulturligo de GDR, 15 *Potsdam*, Margerstr. 34/36

Karin Margaševski — 9208 *Lihtenberg* 124 (16-jara)

Ges-roj Ruth Arlt kaj Horst Arlt — 963 *Crimmitschau*, W. — Liebknecht-str. 12

Ges-roj Ruth Schreckenbach kaj Dieter Schreckenbach — 963 *Crimmitschau*, Mozart str. 9

Else Dressler — 963 *Crimmitschau*, Poststrase 5

Doris Schmiegelt — 963 *Crimmitschau*, W. Schmieder str. 10

Beate Winefeld — 963 *Crimmitschau*, Untere Mühlgasse 20

Ges-roj Renate Henke kaj Horst Henke — 963 *Crimmitschau*, Badergasse 15

Sabine Kölbl 962 *Werdau*, Ziegelstrase 42

Lilly Wagner — Steinpleis b. *Werdau*, Hauptstrase

Hans Siegl — Stejnpleis b. *Werdau*, Hauptstrase

## Hispanio

Manuel Romero Gomez — Arzobispo Apao laza, 32 — Ent. A. — *Zaragoza*

## Hungario

Petras Olga — 4033 *Debrecen*, Szesenbey u. 24 (16-jara lernantino)

Flamis Eva — 9700 *Szombathely*, Kisfaludy u. 55 (23-jara laboristino — kun ĉl)

Eva Aubry — H-1108, *Budapest*, Juhar u. 28 (17-jara lernantino — kun samaĝulinoj, kolektas kantojn)

Eszter Földesdj — 6800 *Hódmezővásárhely* (47-jara laboristo — vojaĝoj, bk, pm, floroj)

## Pollando

Jacek Milek — *Radomierz* 54, 58-520 Janowice Wielkie (18-jara lernanto — kun ĉl)

Tadeusz Grudniewski — ul. Sambora 2/3, 83 — 130 *Pelplin* (kun bulgaroj)

Maria Krocak — *Wroclaw*, kod 51-214, str. Armii Czervonej 54 (23-jara — kun ĉl pri literaturo, moderna muziko, turismo, arto)

Wacław Slipiko — str. Ptacka 7/8, 54 — 066 *Wroclaw* (50-jara — kun ĉl pri lingvistiko, filatelo, turismo, reciproka gastado, libroj, pm)

Irena Niemczyńska — 85 231 *Bydgoszcz*, ul. Królewiej Jadwigi 5/4a 19-jara — kun junuloj pri turismo)

Anna Zakulska — 85 318 *Bydgoszcz*, ul. Nowotki 5/36 (19-jara — sporto, turismo — kun junuloj)

Teresa Kowalec — 85 324 *Bydgoszcz*, ul. Koszarowa 9/122 (21-jara kun junuloj)

Elzbieta Lesniewicz — 85 324 *Bydgoszcz*, ul. Koszarowa 9/113 (22-jara — kun gejunuloj)

Grazyna Krolkowska — *Bydgoszcz*, ul. Powstanców Wielkopolskich 59/3 (kun gejunuloj)

Józef Fijas — 85 324 *Bydgoszcz*, ul. Koszarowa 9a/122 (23-jara — sporto, turismo, elektroniko — kun junulinoj)

Krojniewski Stanisław — 85 324 *Bydgoszcz*, ul. Koszarowa 9a/319 (23-jara — kun fraŭlinoj pri sporto, turismo, mekaniko)

## Sovetunio

Dace Meldere — 226 024 *Riga* 24, str. Silciema 13-74 (15-jara lernantino — kun gejunuloj el ĉl)

Aleksej Aleksandrov 450 025, *Ufa* — 25, str. Karla Marksa 30-28 (20-jara — kun ĉl pri ĉt, prefere pri E-poezio kaj E-kantoj, turismo, fotoj, bk, E-insignoj)

